# La Skolta Mondo

Oficiala organo de la Skolta Esperanto-Ligo 1/2006 Marto




**Legu pri:**

- malnova kaj nova estraro de SEL
- projekto de kolombiaj skoltoj
- skolta agado en la rifuĝejo en Tanzanio
- vagado de germanaj skoltoj en Svedio

**La Skolta Mondo**
**Oficiala organo de**
**Skolta Esperanto-Ligo**
**Nr-o 1/2006 Marto**
The magazine of the
Scout Esperanto League
Gazette de la
Ligue Scoute Espéranto
Gazeta de la
Liga de Scouts Esperantistas
ttt.esperanto.org/skolta/
sel@scoutnet.org
ISSN 0031-6558

**Skolta Esperanto-Ligo:**

**Prezidanto**
Carola Antskog,
poŝta adreso apude
(NR de Finnlando)
cantskog@kolumbus.fi

**Ĝenerala Sekretario**
Guido Ricci,
poŝta adreso
apude (NR de Italio)
guido.ricci@scoutnet.org

**Kasisto**
Allan Fineberg, Usono,
allan.fineberg@gmail.com

**Redaktoro**
Kinga Nemere-Czachowska,
ul. Moniuszki 33/4
87-100 Toruń, Pollando,
sel-redaktoro@scoutnet.org

**Retisto**
Volker Schlüter, Germanio,
eo@pfadfinder
-wilhelmshaven.de

## NACIAJ REPREZENTANTOJ DE SEL (NR)

**Argentino**: Daniel Marcelo, Buenos Aires, danielmarcelo@eresmas.com, **Belgio:** Stein Hautekees, selbelgio@hautekees.be, **Brazilo:** Eluizio B. Rodrigues, R. P. Horacio M. Camargo, 120 / 14, 18048-105 - Sorocaba (SP), **Bulgario:** Ĥristo Mandev, bul. Mogílev 2 II 19**,** Gabrovo 5306, **Ĉilio:** Héctor Campos Grez, Casilla de Correos 231, Curicò, mochila@terra.cl**, Danio:** Bjarke Nielsen, Erdalsvej 30, 2600 Glostrup, benr.bjarke@nielsen.mail.dk, **Finnlando**: Carola Antskog, Brokärrvägen 89, FI-25700 Kimito, tel +358-2-423146, portebla +358-50-5817272, cantskog@ kolumbus.fi, **Francio:** Samuel Gaillard, 5 rue Maurice Ravel, 63 800 Cournon d'Auvergne, goelano@ infonie.fr, **Hindio:** A.S.Venkatesh Reddy espero, No.216, off Main Road, Whitefield, Bangalore-66. Karnataka. tel. 9945057668. esperovr@yahoo.co.in, **Hispanio**: Luis Gilpérez Fraile, Calle Alonso de Pineda 28, E 41007 Sevilla, luis@riskoes.com, **Italio** kiel peranto: Guido Ricci, av Des Muguets 39, 1950 Kraainem, Belgio, **Japanio:** Fumiko Kamaĉi, 3-4-4 Kasumigaoka, Sakai, Osaka, BXL00154@ nifty.com, **Kazaĥio:** Vera Matvejeva, Komsomolskij 40-168, Rudnij 111500, verapm@mail.ru**, Koreio Resp.:** Lee Seung Yun, Hwigyong-l Dong, Seul Garden Apt. 909, Dongdaemun (130-092) Seoul, **Kostariko**: Marvin Segura, Aptdo 1913, San José, kaj **Luksemburgio:** vidu Italio, **Nederlando:** J.K. Hammer, Taxusstraat 7, NL 1505 AA Zaandam, ko.hammer@planet.nl, **Nov-Zelando:** Gwenda Sutton,12c Herhert Gardens, 186 The Terrace, Wellington 6001, gwenda.s@ihug.co.nz, **Slovakio:** Miroslav Havranek, P.O.Box 161, 83100 Bratislava, **Svedio:** vidu Finnlando, **Usono**: Allan Fineberg, 28-24 Sherman Place, Fair Lawn, New Jersey, allan.fineberg@ gmail.com.

# ENKONDUKE

## SKOLTA ESPERANTO-LIGO DENOVE VIGLAS

Post la sukcesa partopreno al la Monda Ĵamboreo en Nederlando 1995 kaj la TEJO / SEL- seminario 1996 okazis malmulte en SEL. La gazeto post 1997 ne plu aperis ĝis 2002, kiam Roberto Resende ekredaktis interretan eldonon de La Skolta Mondo. Antaŭ unu jaro okazis Sud-Amerika Ĵamboreo, kie SEL estis videble aktiva. La informado tie rezultis en grandaj artikoloj i.a. en Revuo *Esperanto* kaj *Kontakto*. Pro tio ni povas danki nian tiaman redaktoron, kiu tuj poste iniciatis renovigon de la Centra Komitato, CK. La elekto de la nova CK okazis la 29-an de julio dum kunveno de SEL en Vilno.

Kiam LSM nun prezentas sian unuan numeron sub la la nova CK, estas tempo por danki la eksajn komitatanojn. Krom la redaktoron Roberto Resende mi volas danki mian antaŭulon prezidanton Franco Abriani, la kasiston David Whitey kaj sekretarion Héctor Campus Grez.

Franco Abriani estis prezidanto de la jaro 1987. Li estis tiam aktiva marskolto kaj li desegnis por LSM kovrilbildon „Pretaj por ŝnurmalligado“. En la jubilea numero de SEL 1993 li konstatis, ke dum la pasintaj jaroj unu el liaj sonĝoj plenumiĝis kiam oni aranĝis internaciajn skoltajn esperantistajn tendarojn.

La plej longdaŭra CK-ano de SEL estas David Whitey, kiu estis kasisto de la jaro 1961. Li multfoje provis forlasi la postenon, sed ĉiam devis denove akcepti ĝin. Li ankaŭ samtempe estis sekretario dum multaj jaroj, ĝis Héctor Campos Grez transprenis tiun laboron en 1995. Héctor jam antaŭe redaktis LSM dum la jaroj 1988-1991. Li daŭrigas kiel Nacia Reprezentanto de Ĉilio.

Kune kun la novaj komitatanoj Guido Ricci (ĝenerala sekretario), Allan Fineberg (kasisto) kaj Kinga Nemere-Czachowska (redaktoro) kaj la nova prizorganto de la retejo, Volker Schlüter, ni nun laboras por nova kresko de SEL. Kiam en 2007 la skoltaro festos sian centjaran ekziston, espereble ankaŭ SEL estos videbla en la Monda Ĵamboreo. Ni jam atingis, ke la insigno de la jubilea jaro aperas ankaŭ kun esperanta teksto:

Unu Mondo, Unu Promeso.

Kune antaŭen!

*Carola Antskog,*
*prezidanto de SEL*

Dum la UK en Vilnius Carola Antskog estis elektita prezidanto de la Skolta Esperanto-Ligo. La kunvenon partoprenis ankaŭ Elzbieta Karczewska de Białystok (Pollando), kiu en la jaro 1968 rekte de Avoto, la fondinto de SEL, ricevis kajereton pri la 50 unuaj jaroj de la ligo.

La nova estraro de SEL nun laboras por reaktivado de la ligo kaj ties videbla partopreno dum la Monda Ĵamboreo en Britio 2007.


## CAROLA ANTSKOG – PREZIDANTO DE SEL:

„Mi estas skoltino de 1954 kaj tri jarojn poste mi unuan fojon vojaĝis eksterlanden kaj partoprenis la 50-an, jubilean tendaregon por skoltinoj en Hyde Park en Anglio. Poste mi aktivis inter skoltinoj dum multaj jaroj. Por mi ĉiam gravis la internacieco de la skolta movado, same por mia filino. Kiam ni en la jaro 1986 en Scoutposten (la gazeto por svedlingvaj geskoltoj en Finnlando) legis pri vojaĝo en Esperantujo, ni interesiĝis. Estis skribite i.a., ke oni povas ie ajn trovi telefonnumeron sub la vorto Esperanto kaj ni kontrolis tion en la regiona telefonlibro. Ni trovis 7 telefonnumerojn! Ni telefonis al unu el ili kaj poste venis koverto kun informoj.

En Scoutposten estis ankaŭ informo pri Skolta Esperanto-Ligo kaj ni preskaŭ tuj aliĝis. La lingvon ni lernis rapide kaj jam en 1989 ni aranĝis kurson por skoltoj, kiun gvidis Georgo Handzlik el Pollando.

Ekde la jaro 1992 mi multe helpis al mia filino redakti La Skoltan Mondon. Dum tiu tempo mi estis aktiva Nacia Reprezentanto kaj multe informis pri Esperanto al geskoltoj. Post 1997 miajn fortojn mi bezonis por aliaj taskoj. Restis tamen la intereso por Esperanto kaj skoltado, sed plejparte la du interesoj ne estis ligitaj unu al la alia.

Kiam printempe 2005 la diskuto pri renovigo de la ligo ekflamis, mi aktive sekvis ĝin kaj finfine decidis akcepti la taskon de prezidanto. Tio ja donas al mi eblecon denove viziti tendaron en Britio 50 jarojn post mia unua eksterlanda tendaro”.




*Carola Antskog dum la UK en Vilnius 2005*

## CENTRA KOMITATO DE SEL

### GUIDO RICCI – ĜENERALA SEKRETARIO

Mi iĝis skolto en 1978 en Ĝenovo, en la itala katolika geskolta asocio AGESCI. En 1983 mi legis anoncon en rovera revuo: ĝi venis de pola skoltino, kiu volis korespondi esperante kun itala skolto. Ĝian publikigon peris la tiama Nacia Reprezentanto de SEL en Italio - Franco Abriani.

Mi ekkorespondis kun la skoltino kaj serĉis kelkajn lernolibrojn. Post unu jaro mi flue parolis Esperanton. Tiu skoltino estas nun la redaktorino de LSM.



*Guido kaj Matteo*

Mi iĝis skoltestro kaj dum kvar jaroj mi estris la trupon Ariete de la grupo Genova 10 kaj dum du jaroj ĝian klanon Acqua dei Frati. Samtempe mi studis juron.

Mi instruis Esperanton al kelkaj skoltoj kaj aplikis ĝin en regiona kaj distrikta agado. En la universitato mi kunfondis studentan E-rondon, kiu organizis publikajn lingvokursojn.

En 1989 mi diplomiĝis per tezo pri lingvaj problemoj en internaciaj traktatoj kaj plustudis diplomation antaŭ komenci mian advokatan praktikon. Poste mi studis eŭropajn aferojn en Belgio kaj eklaboris en la eŭropa justica kortumo en Luksemburgo.

En 1994, post dujara komuna skolta agado kaj kvarjara fianĉiĝo mi edziĝis al Sabina. Mi iĝis Nacia Reprezentanto de SEL en Luksemburgio kaj dum du jaroj ni ambaŭ agadis kiel skoltestroj en la loka skoltgrupo Robert Schuman.

En 1997 mi komencis labori en la jura servo de la Eŭropa Parlamento kaj ni translokiĝis al Bruselo. Tie en 2000 ni kunfondis internacian skoltan grupon BC25 Sankta Benedikto en la belga katolika skolta asocio FCS. En 2001 kaj 2005 alvenis niaj filoj Stefano kaj Matteo.

En 2005 la brazilano Roberto Resende, elstara aktivulo de SEL, ekklopodis renovigi la ligon, kies agado stagnadis, kaj instigis min eniri en la Centran Komitaton de SEL.

Mi konsciis ke Esperanto kaj skoltismo donis al mi multon, kaj ke venis tempo por mi iom redoni. Mi jam estis reduktinta mian agadon en la brusela skoltgrupo kaj mi akceptis la kandidatiĝon al la posteno de Ĝenerala Sekretario de SEL. Mi estis elektita kaj per interreta enketo kaj en la oficiala kunveno de SEL dum la UK de 2005.

# BOGOTA PROJEKTO

**En Bogoto (Kolombio) formiĝis la komitato de skoltoj kaj esperantistoj por starigi novan skoltgrupon en malriĉa kvartalo, kie infanoj multon povus gajni per Esperanto kaj skoltado. Laŭ la kolombiaj aktivuloj, bogotaj knaboj bezonas plilarĝigi siajn horizontojn - skoltismo kaj Esperanto povas helpi ilin.**

## LA INTERVJUO KUN MATEO BOTERO, SKOLTO, UNIVERSITATA PROFESORO, INICIATORO DE LA BOGOTA PROJEKTO

**LSM:** Kiu kaj kiam elpensis la projekton?

**Mateo Botero**: La ideo naskiĝis en novembro 2005 dum mia interparolo kun Guido Ricci, la ĝenerala sekretario de SEL. Ni havas eblecon uzi terenon en Bogota, kies posedanto estas mia patro Camilo, por organizi skoltan grupon por malriĉaj infanoj loĝantaj en la kvartalo Las Cruces en Bogoto.

Tute hazarde antaŭ du jaroj similan ideon havis Jorge Aŭrelio Diaz y Luis Jorge Botero, sed ili planis ke la skoltoj parolos esperante.

**LSM:** Kiaj estas la plej gravaj ideoj de la projekto?

**Mateo Botero**: Mi respondos en punktoj:

A. Ligi skoltismon kaj ĝian metodon kun la universala lingvo. Esperanto estas la akso, kiu povas apogi agadon de la grupo. Dank' al skoltismo infanoj povos lerni fremdan lingvon, kio poste helpos al ili lerni alian, pli malfacilan lingvon, ekzemple la anglan,

B. Montri alian eblecon por uzado de sia libera tempo - doni ĝin al infanoj, kies familioj vivas je malpli ol unu usona dolaro po tage. Eduki ilin esti bona civitano (tion donas skoltismo)
kaj samtempe doni kontakton kun la facila lingvo – tio gravas en nia nuntempa, globalizita mondo,

C. Plibonigi estontajn disvolviĝeblecojn de la malriĉa kvartalo, kie la nivelo de krimeco estas tre alta,

D. Gardi junularon de agoj limiĝantaj krimon, entreprenataj pro manko de aliaj eblecoj kaj la rasa segregacio,

E. Plifortigi la ideon de unu lingvo universala, kiu servas kiel ekzemplo por aliaj skoltaj grupoj.

**LSM:** Kiel aspektas la unuaj preparpaŝoj?

**Mateo Botero**: Ni decidis renkontiĝi unufoje monate por diskuti sekvontajn paŝojn. La kurso de Esper anto por skolestroj okazas ĉiusemajne. Ni planas organizi ekskurson de skoltestroj ekster Bogoto por ekzerci la lingvon praktike. Laŭ nia plano post ses monatoj, tio estas aŭguste, ni oficiale komencos agadon de la grupo kaj decembre ĝi estos jam formita.




*Mateo Botero ĉe la olimpia stdiono en Torino, Italio*

**LSM:** Kiu instruos Esperanton al skoltoj?

**Mateo Botero**: Tri personoj ligitaj kun la projekto jam estas esperantistoj. Ili praktikos en tri diversaj skoltaj grupoj por kompreni laborsistemon de la skolta movado kaj instruos la lingvon al skoltoj. Poste ni pripensos kiamaniere ni instruos infanojn. Plej bone estus, ke skoltestroj parolu Esperanton, gvidante la grupon. Tiamaniere infanoj lernos la lingvon praktike, kiel diras la skolta metodo.

**LSM:** Ĉu estas malfacile konvinki la estrojn, ke ili lernu la lingvon?

**Mateo Botero**: Ni ankoraŭ ne havas sperton, la projekto komenciĝas. Cetere multaj skoltestroj devis forlasi la agadon pro manko de mono kaj la ebleco membriĝi en grupo sen financaj zorgoj povas allogi ilin al la lernado de Esperanto.

**LSM:** Por realigi la projekton certe vi bezonos monon. Kiel vi solvos tiun problemon?

**Mateo Botero**: Multe helpis jam al ni Guido Ricci. Li planis bapti sian filon kaj kune kun Sabina, lia edzino, petis gastojn de la baptoceremonio donaci monon anstataŭ donacoj. Tiamaniere ili kolektis preskaŭ 800 eŭrojn kaj transdonis monon al ni. Ankoraŭ ni ne decidis por kio ĝin uzi. La mono sufiĉus por subteni unu patrolon dum unu jaro (kotizoj, uniformoj, tendaroj). Pri uzo de la mono respondecas mia patro Camilo, kiu estas skolto, kasisto kaj revizoro de skoltgrupo, profesia librotenisto kaj advokato. Eble ankaŭ aliaj skoltoj de la mondo povas helpi nin finance?

**LSM:** Kiom da personoj aktivas nun en la projekto?

**Mateo Botero**: Sep: Jorge Aŭrelio Diaz, Camilo Botero Rey, Rodrigo Ramirez, Luis Jorge Santos, Humberto Mayorquin, Fernando Ruiz kaj mi.

**LSM:** Mi deziras sukceson.

**Mateo Botero**: Koran dankon.

*(Intervjuis kaj esperantigis: Kinga Nemere-Czachowska)*

## TANZANIO:

# KURAĜO EN MALFACILAĴOJ

**Nicodeme Ntakirutimana rakontas:**

**Pri mi:**
Mi estas Burundano, mi forkuris en 1997 dum la civila milito inter la etnaj grupoj Tutsi kaj Hutu, kiu komenciĝis en 1993. Tiam mi venis al Tanzanio, kie mi estas ĝis nun en Rifuĝejo Mtabila. Tie mi ekkomencis lerni en la mezlernejo kaj en aŭgusto 2005 mi diplomiĝis pri agrikulturo kaj bredado.

En 1998 mi iĝis skolto, post du jaroj oni „baptis" min sub la nomo Sapajou Courtois franclingve (Afabla Kapucena Simio). Ekde 1999 mi lernis Esperanton. Mia instruisto estis s-ro Nyabenda Jacques. Mi diplomiĝis pri la instruado de Esperanto ĉijare, dum restado en Buĵumburo (Burundo), kie mi partoprenis la kurson de s-ino Tereza Kapista. Nun mi instruas la internacian lingvon en la rifuĝejo. Alian laboron mi ne havas. Mi okupiĝas nur pri la skolta movado kaj instruado de Esperanto.

**La vivo en rifuĝejo:**
Alta Komisarejo de UN por Rifuĝintoj disdonadas al ni kelkajn erojn por prepari manĝon. Ni ricevas: 5 kilogramoj da maizgreno, 1 kg da fazeoloj aŭ pizoj, 20 g da vegetala oleo, 10 g da salo pro persono ĉiun duan semajnon kaj unu pecon da sapo ĉiumonate. Ni trovas lignon por kuiri la manĝaĵojn je la distanco de 40 km.

**Mia skoltgrupo:**
Ĝi konsistas el 72 skoltoj kaj ĝi estas dividita en 3 unuoj:

1. svarmo da lupidoj 8 ĝis 12-jaraj, kiu havas kvar sesopojn.
2. trupo da skoltoj 14 ĝis 16/17 jaraj, kiu havas kvar patrolojn.
3. bando da roveroj 18 ĝis 24-jaraj, kiu havas tri ekipojn.
4. Ĉe la tri unuoj agas plenkreskaj skoltoj: estroj (Sachems) kaj Maljunaj
5. Lupoj. Ili gvidas kaj instruas al la aliaj. Ili estas 6 kaj kun kelkaj aliaj skoltoj estas la stabo de la Grupo.

**Niaj taskoj:**
Dum la lastaj jaroj ni helpadis homojn, kiuj troviĝis en malbonaj kondiĉoj. Ekzemple, ni streĉis tendojn, ĉar ni antaŭe loĝis sub tendoj sed ekde la jaro 2000 kelkaj rifuĝintoj ekkonstruis brikajn dometojn kaj kovris ilin per herbo.

Ni helpis ankaŭ ĉerpi akvon, ĉar ni ne estas en urbo, nek en vilaĝo: oni permesis al ni loĝi sur montoj inter arboj, sed la arboj tie ĉi jam estas ĉiuj fortranĉitaj, tial ni trovas ilin for de la tendaro.

Nun ni helpas precipe orfojn kaj la plej maljunajn homojn, alportante al ili lignon por kuirado kaj zorgante pri aliaj hejmaj taskoj, necesaj malgraŭ la malfacila situacio.

Ni daŭrigas niajn laborojn, ĉar skolto havas kuraĝon en malfacilaĵoj.

Mia adreso:
p.o.box 211, Kasulu,
Kigoma, Tanzanio



*Grupo de skoltoj en la rifuĝejo. Nicodeme staras maldekstre kun la ĉapo surkape.*

## HELPPETO

Por plialtigi vivkondiĉojn de la skoltmovado en la rifuĝejo Nicodeme Ntkarutimana, kies rakonton ni povas legi en la antaŭa paĝo, planas starigi projekton de bredado de kaprinoj kaj kokinoj. Realigo de la projekto helpos al skoltoj aĉeti uniformojn, koltukojn, ŝuojn. Helpos ankaŭ prizorgadon de malsanuloj kaj eble sufiĉos por pagi lernkostojn al pli junaj skoltoj de la grupo.

Ĉiutaga revo de Nicodeme estas trovi monon por korespondi esperantlingve kun alilandaj skoltoj (ntakinic@yahoo.fr), ekzemple pagi por uzado de retkafejo. Nicodeme substrekas, ke li studis agrikulturon kaj bredadon de bovoj, kaprinoj, ŝafoj kaj kokinoj, do li scipovas bredi kaj kuraci ilin.

Se vi aŭ via trupo volas helpi lin, bonvolu kontakti la Prezidanton de SEL por pliaj informoj. (adreson vidu en la paĝo 2 - NR de Finnlando).

### MEDALO PRO TOLEREMO

Edukadon de junularo distingis la Fondumo Zamenhof, kiu januare aljuĝis al Monda Skolta Organizo (WOSM) la „Medalon pro Toleremo“. La aljuĝon proponis d-ro L.C.Zaleski-Zamenhof – nepo de la kreinto de Esperanto. La medalon la Fondumo Zamenhof aljuĝis ĉijare ankaŭ al „la pola simbolo de dialogo”– profesoro Władysław Bartoszewski.

## SKOLTISMO EN LA MONDO

**Tra la tuta mondo skoltismo similas, sed en diversaj landoj samtempe ĝi diferencas. La Skolta Mondo ŝatas montri la diversajn kutimojn en la ĉiutaga vivo de skoltaj grupoj. Tio helpas kompreni skoltajn gefratojn el aliaj landoj. Eble vi trovos interesajn aferojn, dank' al kiuj vi povos pliriĉigi vian propran skoltaron. Ni komencas per raporto de germana patrolo.**

Skoltismo disvastiĝis rapide tra la mondo. Ĝi estis tute nova afero en plejmultaj landoj. Sed en Germanio skoltismo renkontis junularan movadon, kiu jam ekzistis. Tiu movado germana nomiĝis Wandervogel, tio signifas laŭvorte: migranta birdo. Ĝi ankaŭ konis la patrolsistemon, kaj ĉefe restadas en la naturo. Tial ĝi parte tre similas al la skolta movado. Sed aliflanke ambaŭ movadoj tre diversas. La Wandervogel ĉerpis de la malfruromantika kulturo. Krome ĝi estis la emancipada movado de la germana junularo.

La germanaj geskoltoj akceptis kelkajn formojn de la alia movado. Tial ekzistas tie hodiaŭ speciala skolta tradicio. Parto de ĝi estas la granda vagado. Alilande oni preferas tendaron por la somera aranĝo. Multaj patroloj germanaj vagadas plursemajne tra nekonataj regionoj. La programo ne estas planata. Ĝi aperas hazarde. La travivaĵoj dum unu vagado ofte kaŭzas fortan amikecon inter anoj de la patrolo.

La etoson vi eble sentos iomete, se vi legos la raporton je apuda paĝo. Ĝi estas vojaĝrakonto de mia patrolo.

*Volker Schlüter*

### VUOLGGE MU MIELDE BASSIVÁRRÁI

**Survoje tra la vilaĝo Handölsdalen**

Se oni pensas pri vilaĝo, oni imagas kelkajn domojn. En ilia mezo situas vendejo, preĝejo kaj trinkejo. Tian lokon oni konas parkere jam post la unua vespero kaj oni komencas enui tie dum la venonta mateno. Fari grandan vagadon tra tia vilaĝo estus



eble la plej malinteresa afero, kiun oni povas imagi.

Koncerne tion ŝajnas miriga, ke ni - ses skoltoj germanaj - intencis esplori la vilaĝon Handölsdalen en meza Svedio dum du semajnoj dum la lasta somero. Sed Handölsdalen ne estas iu ajn vilaĝo. Ĝi situas proksime al la norvega urbo Trondheim kaj estas


*Boaco*


samea vilaĝo, loĝata de la norda popolo - sameoj kiuj ekde ĉiam sin vivtenas per boacobredado. Pro tio en tiu-ĉi vilaĝo ĉio dependas de la boacoj. Ĉi tie troveblas nek domo nek bieno, nek elektro nek strato. Anstataŭe ekzistas vastaj arbaroj, malsekaj marĉoj kaj ŝajne senfinaj vastaĵoj.

Antaŭe la sameoj sekvis sian boacaron serĉantan manĝaĵojn. Ili dormis en tendoj, kuiris ĉe la fajro kaj rezistis la naturajn malbonaĵojn.
Tiuspecan vivon ni ŝatis percepti. Ni prenis nian



tendon, malplenigis la vendejon en la lasta antaŭposteno de la civilizacio, tiel ke nenio pli enpremeblis en la dorsosakojn, kaj eniris la vilaĝan sovaĝejon de Handölsdalen.

Ni sekvis la vojmontrilojn, kaj migris laŭrivere tra pinaroj. Vespere ni serĉis bonan lokon por nia tendo. Multaj kulpikoj atakis nin ĝis la arbolimo, kie la malvarma vento forblovis malgrandajn sangsuĉantojn.



La vojo supreniris al montpasejo kaj aliflanke malrapide kondukis nin malsupren. Ni sekvis riveron en la valo kaj ĝoje salutis unuajn betulojn, ĉar ili promesis preparon de varma fajro. Ni trapasis multajn riveretojn, fluantajn sur montaj flankoj. Post ĉirkaŭ 70-kilometra irado ni feliĉe atingis staciodomon.



Kvankam ni postlasis la lastajn domojn, kaj malantaŭ ili akceptis nin fremda mondo. Ĝi lernigis al ni siajn nekonatajn regulojn: ni sentis la benon devarmiganta fajro, la gravecon de seka dormoloko, la forton de malvarmegaj montaraj riveretoj, la feliĉon de la sunbrilo kaj la perfektan harmonion en la senfinaj vastaĵoj de la montaro.

Nur kiam ni formanĝis la lastajn eretojn de nia provizo, ni forlasis la svedan sovaĝejon kun okuloj ridantaj kaj samtempe plorantaj. Ni revenis hejmen kun bunta bukedo da novaj spertoj kaj novaj komprenoj.

*Volker Schlüter*



## SEL AKTIVOS DUM LA MONDA ĴAMBOREO 2007

Jam de duonjaro laboras grupo por havi informadstandon kaj aliajn aktivecojn dum la Monda Ĵamboreo en Britio. Ĝi okazos apud Londono de la 27-a de julio ĝis 8-a de aŭgusto 2007. La temo de la Ĵamboreo estas „Unu Mondo Unu Promeso“. 40 000 junuloj tendumos, vivos kaj laboros kune.




Ili reprezentas diversajn kulturoj, parolas diversajn lingvojn kaj havas diversajn religiojn. Kune ili festos tion, kio interligas ilin, la promeson, kaj lernos kune konstrui pli bonan mondon.

La Monda Skolta Organizo (WOSM) produktas la jubilean insignon en diversaj lingvoj, ankaŭ en Esperanto. Oni povas aĉeti ĝin tra la Nacia Reprezentanto de Hispanio. La simbolo de la insigno estas la aspiroj kaj esperoj de junaj homoj por la estonto. Oni vidas la sunleviĝon por la nova jarcento, la naturon, la jaron de la jubileo kaj pacon, kiun ni kune atingu. Inter la partoprenantoj en MĴ-2007 espereble estos ankaŭ dekoj da esperantlingvaj geskoltoj. Se vi interesiĝas pri laboro por lingva egaleco dum MĴ-2007, kontaktu la Centran Komitaton tra la adreso: sel@scoutnet.org *(Carola Antskog)*

## KIEL MEMBRIĜI KAJ ABONI

Ĝis la jarkunveno en Florenco SEL akceptas senpage novajn membrojn. Por esti membro, sendu al la Ĝenerala Sekretario (vidu p.2) informojn pri vi mem: nomo, familinomo, naskiĝtago, sekso, eventuala ĉasnomo, retpoŝta adreso, telefonnumero, skajpnomo, strata adreso, poŝtkodo, urbo, lando, nomo de via skolta asocio.

La gazeto *La Skolta Mondo* aperas senpage rete, sed vi povas aboni ĝin surpapere pagante al la konto selx-m ĉe UEA abonkotizon: 100 % de MJ.

(UEA tarifo, vidu www.uea.org /alighoj/alighkotizoj.html). Nepre informu la ĜS pri la pago. Vi povas pagi tra la UEA-peranto de via lando aŭ rekte al la konto de UEA:
(IBAN: NL66ABNA0426051599
SWIFT: ABNA NL2R).
UEA akceptas ankaŭ kreditkartojn kaj PayPal kun 5%-a administra aldonkosto.

## Korespondi deziras:

**Ania Książek**, 20-jara polino, studentino de psikologio, skoltino. Ŝi ŝatas fotografi, vojaĝi, ludi gitaron kaj aŭskulti muzikon. Skribu al: motyl_motyl@wp.pl